

The North American

ESPERANTO REVIEW

IN THIS ISSUE:

A New Era for Esperanto

El la Fruaj Tagoj:

Dan Ward Gibson

Novelo de R. J. French:

Tagmeza Fantomo

II: 1-2

January - February, 1955

Good Books for Your Spring Reading

La Knaboj de Paŭlo-Strato30
La Princo kaj Betty35
La Alia Pasinteco	3.00
Gosta Berling35
Kiso de la Reĝino75
Kredu min, Sinjorino	1.65
Murdo en la Orienta Ekspreso35
La Nekonata Konato	<i>paper, \$1.00; bound</i> 1.25
Princino de Marso35
Ringo de Generalo75
La nova Testamento	\$.25 and .50

Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.

TEXT BOOKS, DICTIONARIES, READERS

The Esperanto Teacher	\$.45
Esperanto for Beginners10
Nelson's Esperanto Course	1.50
Step by Step in Esperanto	1.50
The Edinburgh Pocket Dictionary85
Fulcher and Long English-Esperanto Dictionary	2.35
Millidge Esperanto-English Dictionary	2.50
Johano kaj Silvio30
Junaj Detektivoj35
Gaja Leganto per Esperanto30

Write for complete Book-List:

Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.



The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Third Year

January-February, 1955

No. 1-2

CONTENTS

A New Era for Esperanto	2
Ho ve, nenie rozoj tiom ruĝas	3
Esperanto in North America	4
Esperanto around the World	5
<i>El la fruaj tagoj</i> : Dan Ward Gibson	6
Netaŭga Reklamo	7
<i>Novelo</i> : Tagmeza Fantomo	8
Esperanto and Stamps	10
Reviewing the "Review"	11
Novaj Libroj	12
Bolonjo Vokas	13

The North American Esperanto Review

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

Addresses: Subscriptions and bulk orders should be sent, with payment, to the Treasurer. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the League Secretary. Send literary contributions, news items, announcements, etc. to the Editor: David B. Richardson, 3412 No. Mullen, Tacoma 7, Wash.

Deadlines: The *Review* is placed in the mails about the fifteenth of every second month. Material for publication must be in the hands of the editor no later than

the 15th of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *President*: John L. Lewine, 52 Riverside Drive, New York 24, N. Y.; *Vice-President*: James D. Sayers, RFD 2, Lillie, La.; *Secretary*: Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer*: Edward W. Pharo, Jr., County Line Rd. and Simms, Somerton 16, Pa.; *Chairman, Executive Board*: F. R. Carlson, 2116 N. 35th St., Seattle 3, Wash.

Membership Dues: Regular Member, \$3; Supporting Member, \$5; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member but receiving only one copy of publications, etc., \$4.

Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.

Make checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."

A New Era For Esperanto

The passing of one age and the beginning of a new one is often greeted with a certain amount of regret, or nostalgia, on the part of those who lived through the "good old days." The hardy pioneer who won the West must have felt that way when the West was won and the days of the frontier were over. The pioneer Esperantist, however, looks forward with great longing to the day when the pioneering job is through and the International Language has assumed its intended place in the world society. For, even though there are many ways in which Esperanto is put to practical use today, basically most active Esperantists are idealists; they are convinced that solving the language problem will in some measure, be it large or small, make the world a better place.

Now it appears that the pioneering days will soon be over. Almost daily we see new signs of this. The favorable action taken by the Eighth General Conference of UNESCO last November in officially expressing its intention to work with the Universal Esperanto Association in connection with the move to introduce Esperanto into the school systems, as reported in our last issue, is merely one such sign. Probably more significant is the new attitude of the public, once disinterested, now beginning to realize

that "maybe the Esperantists have something there, at that." Precisely this new attitude toward Esperanto was discussed by Mary Margaret McBride in a recent column, which started this way: "The quicker we get an international language the better. . ."

This does not mean, of course, there is no longer any need to "sell" Esperanto to the public. Even Mary Margaret, I am sure, would be surprised to know the whole story of what has been accomplished already in the International Language movement and what can and will be accomplished in the future in the fields of literature, science, commerce, radio, motion pictures, and many others. As a matter of fact, many Esperantists would be astounded to learn some of these things, and will be, when they read the new book: *The International Language, Facts about Esperanto*, edited by Dr. Ivo Lapenna. This book, published by the Universal Esperanto Association, is no doubt the most complete compilation of data about the language problem and Esperanto that has ever been published between two covers. It is divided into three parts: "Esperanto as the solution to the problem of international language," "Esperanto organizations, their aims and functions," and "The Universal Esperanto

Association." The first part treats of such subjects as the structure and evolution of Esperanto, instruction of Esperanto, Esperanto literature, publications, and practical applications of Esperanto. Although the table of contents reads like something you would expect to find in a difficult, dry college textbook, actually it is a goldmine of facts and figures covering every phase of the subject. For instance, in Part One, there is an entire chapter devoted to pertinent quotations from famous scientists, authors, and other world figures, including Sir William Ramsey, Upton Sinclair, Edouard Herriot, Luigi Einaudi. An exhaustive chapter on Esperanto literature lists outstanding contributions of original and translated works of poetry, short stories, plays and novels by Esperantists of more than 20 different nationalities, besides sketching the development of Esperanto literature over the past 60 years.

There is not space here to give even a thumbnail description of the vast amount of information contained in this new book. Every Esperantist should get a copy, read it, and become better informed. Even more important, the book should be made available—as quickly as possible—in the various national languages and placed in book stores and libraries from Oshkosh to Timbuctu. A project of the highest urgency should be for each national Association to make a translation and arrange for its publication.

The International Language, Facts about Esperanto can be the handbook of Esperanto's new era. A public becoming increasingly receptive to

the idea of International Language should be provided with this competent source of factual information.

D. B. R.



Ho ve, nenie rozoj tiom ruĝas

Jens Baggesen

Ho ve, nenie rozoj tiom ruĝas,
nenie dornoj pli indulgas nin,
nenie sur lanugojn ni rifuĝas
pli molajn ol en hejmo ĉe patrin'.

Amata loko, kie la orelo,
ravita pro printempa harpo-ton',
imagis harmonio el ĉielo
arbaran eĥon de patrin-kanzon'.

Kun vano levas sin en fremda foro
montaroj kun ĉielo-tuŝa pint'.
Ho, vana eĉ ĉielo, se la koro
ne trovós tie plaĉon de l' pasint'.

(*El la nova libro, "Rozoj kaj urtikoj", de Poul Thorsen. Vidu recenzon sur paĝo 12.*)

ESPERANTO IN NORTH AMERICA

Esperanto and the Press

A letter from ELNA's Publicity Director, Adrian Hughes, was published in the January issue of *Americas* magazine. The letter brought requests for information from as far away as Mexico and Argentina. *Americas* is published in three simultaneous editions in English, Spanish, and Portuguese.

A letter from Llewellyn Jones, of Cambridge, was printed in the Jan. 24 issue of the *Boston Globe*. The letter gave details of the recent action of UNESCO in behalf of Esperanto and listed officers of the Esperanto League with their addresses. The letter was printed under the caption: "UNESCO Backs Esperanto Bid."

Minneapolis' *Midland Cooperator* published an excellent letter to the editor by Glenn Turner on "the True Way to Peace." Esperanto was mentioned as one factor in the proposed peace formula. Mr. Turner's radio program, "Esperanto Now," is now in its sixth year over WMFM, Madison.

"Man — Jungle-wise and Other-wise," is the title of a most interesting book, with many illustrations and a scholarly Appendix, which outlines man's advance from the primitive sub-human species right up to the atomic age. It was written by ELNA-member John McNaughton, Box 516 R.R. 1, Sidney, B.C., Canada, from whom copies are obtainable (cloth bound: \$1.75; light board: 75c).

Mark Starr, Educational Director of the International Ladies Garment Workers' Union, and a member of ELNA, is co-author of a book entitled "Labor in America," written especially for high school students. (The book is obtainable from the Union at 1710 Broadway, New York 19, N.Y.)

New York City

Louis Dormont, past Secretary of the Esperanto League, delivered a lecture on the subject of Esperanto Sunday, Jan. 9, at the Forum of the Muses in Steinway Hall.

San Diego

Our active member, Dirk Brink, and his family have moved here from Los Angeles to escape the smog. Lengthy feature articles in the *San Diego Evening Tribune* described Dirk's experiences during and after the war (see *Niaj Membroj*) in Sept., Oct., 1954, *Review*), and gave favorable publicity to Esperanto. Dirk is teaching Esperanto to one class of young couples meeting at the home of Francis Helmuth, and to another in a San Diego High School.

Tampa, Fla.

George Wagner was guest speaker at the Jan. 18 meeting of the South Hillsboro Lions Club. As a result of Mr. Wagner's talk at least one new study group is being formed in the South Hillsboro area. Two days later the talk was repeated for the West Hillsboro Lions Club, where a great deal of interest was shown.

Talks before other Service clubs around Tampa are being arranged for Mr. Wagner.

Chicago

The annual convention of the National Society for the Study of Communications took place during the last week of December. One of the most important meetings considered the international language question. Among the treatises presented was one by Dr. Sidney S. Culbert of the University of Washington, who discussed the flexibility of the semantic dimensions of several languages. By his analysis,

ESPERANTO AROUND THE WORLD

50th Anniversary in Munich

The Esperanto Society "Laboro" recently celebrated the fiftieth anniversary of its founding with a special banquet at the famous Kolping House. The group's president, Konrad Deubler, addressed the large gathering speaking of the early days of the Esperanto movement in Germany. The two youngest of the Munich Esperantists, 8-year-old Annemari Nobauer and 5-year-old Hans Bernhard, were featured on the varied program, the highlight of which was the honoring of ten pioneers whose memberships date back over 40 years.

Esperanto Voice Correspondence

A new international organization, Magnetofona Esperantista Komunumo (MEK) has been organized as a result of an article in the October, 1954 issue of *Esperanto* suggesting the use of wire and tape recordings in international correspondence in Esperanto. The author of the article, Ole Nederland, received about two dozen letters from Esperantists in over a dozen different countries expressing approval of the idea and indicating their readiness to participate. If you have access to a tape or wire recorder and wish to take part, write to: Ole Nederland, C.A., Oksbol, Denmark. (After March 31 address letters to: Ole Nederland, Tommerup, Kalundborg, Denmark.)

Esperanto is much more suitable than the modified national languages with which he compared Esperanto.

Many members of the Society were surprised when they saw copies of *Scienca Revuo* and dictionaries of scientific terms in Esperanto, and promised to consider Esperanto more seriously.

1955 CONGRESSES

The British Esperanto Association's 39th Congress will be held at Easter in The Hayes.

The 1955 Argentinian Esperanto Congress will take place in Rosario April 7 to 10. Brazilian Esperantists will also attend.

Yugoslavian Esperantists will hold their 1955 Congress at Sarajevo from the 2nd to the 5th of July.

The Christian Esperanto League plans to hold its Congress in Reims, France, July 23-30.

Esperanto-speaking railwaymen will meet in Zurich, Switzerland, in May, with a *post-kongreso* scheduled for the 14th to 16th of May in Homburg, Saarland.

Various advanced Esperanto courses, including one for Cseh-method teachers, will be held this year, July 17 to 24, at Helsingor, Denmark. For information write: L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhoj, Denmark.

HEROLDO DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA
ORGANO DE LA ESPERANTO-
MOVADO

Prezoi:

Abono tutjara	\$4.00
Abono januaro-junio	2.50
Abono julio-decembro	2.00
Abono subtenanta	8.00
Anonceto po 25 vortoj50

Nordamerika peranto:

Donald E. Parrish
328 West 46th Street
Los Angeles 37, Calif.

El la fruaj tagoj:

Dan Ward Gibson

S-RO DAN W. GIBSON estis unu el la fruaj Esperantistoj en okcidenta Usono. Li komencis studi Esperanton en Tacoma, Wash., ĉirkaŭ la jaro 1907 aŭ eble 1906. Kvankam li ne havis formalan edukon li estis rimarkinde klera homo, kiu sorbis Esperanton same facile kiel spongo sorbas akvon. Post rimarkinde mallonga tempo li kapablis traduki bonstile kaj ankaŭ verki belajn originalajn artikolojn.

Pro tio ke li havis nek profesion, nek okupon, li ĉiam estis maltrankvila. Fine, unu someron, li decidis fari vojaĝon piede al Yellowstone-Parko. Li konstruis tre malpezan puŝveturilon kun bicikla rado, kolorigis ĝin verda, kaj metis la kvinpintan Esperanto-stelon ambaŭflanke. En la veturilo li portis mangilaron, nutraĵon, silkan tendon, fotoaparaton, skribpaperon, k.t.p. La tagĵurnaloj publikigis artikolojn pri li kaj lia veturilo.

Frue unu matenon li komencis sian vojaĝon, fiere puŝante sian verdan veturilon. Du tagojn poste ni legis en la ĵurnaloj ke regas terura arbarbrulado en la Cascade-montoj. Pri Gibson ni aŭdis nenion.

Post unu semajno lia amiko, J. W. Wood, alia Esperantisto, ricevis leteron en kiu Gibson informis lin ke pro la

brulado li devis daŭrigi sian vojaĝon per trajno, sed eĉ en la vagono la temperaturo estis preskaŭ netolerebla kaj granda danĝero minacis la pasaĝerojn. Li fine atingis la parkon, sen mono, ĉar sian tutan monsumon li estis elspezinta por fervojbileto. Urĝe bezonante monon, li nun serĉis laboron en la parko. Bonŝance, preskaŭ samtempe kun la alveno de Gibson alvenis ankaŭ multaj ĉarpentistoj por pligrandigi la grandan hotelon, kiu jam estis tro malgranda por la multaj turistoj. Gibson fariĝis estro super la laboristoj.

Kiel estro li estis tiel afabla, bonkora kaj humila ke la laboristoj alte respektis lin, kaj kiam la laboro estis finita ili honoris Gibson ĉe bankedo.

Gibson nun havis iom da mono. Li revenis al Tacoma, verkis tre interesan poemon pri la konstruo de la granda hotelo, faris ilustraĵojn por la poemo, tiam mem kompostis kaj presis ĝin. Ekzemplerojn de la libreto li donacis al la ĉarpentistoj kiuj laboris sub li.

Gibson, kredante ke laboro estas pli facile akirebla en granda urbo, veturis al Chicago. En la tagĵurnaloj li avide legis la paĝojn proponantajn laboron. Tie li trovis anoncon ke granda reklamkompanio bezonas viron spertan pri la aranĝo de ilustraĵoj kaj teksto por la

kompania gazeto kaj la ĉiutagaj ĵurnaloj. Gibson absolute nenion sciis pri tiaj aferoj, sed li bezonis laboron kaj tial vizitis la prezidanton de la kompanio kaj asertis ke li estas sperta pri reklamado. “Ĉu vi konas iun, kiu povas garantii vian kapablon?” “Jes”, respondis Gibson, “J. W. Wood, Tacoma.” La prezidanto telegrafis al Wood. Wood respondis, “Mi bone konas Gibson; vi ne faros eraron se vi dungos lin.” Gibson estis akceptita.

Dum tuta monato Gibson sentis sin kvazaŭ en inkubo. Li studis la kompanian gazeton, laboris ĉiunokte ĝis noktomezo, sed fine fariĝis sperta pri sia nova okupo. Tiel lerta li fariĝis ke post kelkaj jaroj li mem estis unu el la ĉefoj de la kompanio, kaj li laboris por tiu kompanio dum multaj jaroj. Bedaŭrinde, dum tiu tempo li ne havis tempon por dediĉi al Esperanto.

Gibson ofte sopiris al okcidenta Usono. Fine li iris al Seattle, kie li organizis sian propran reklam-kompanion, kiu post tempo havis grandan sukceson. Jarojn poste lia aĝo malpermesis al li forte labori kaj li eksciis el la kompanio. Li nun akceptis okupon kiel konsilanto al milionulo, kaj havis pli da libera tempo kaj komencis pensi pri Esperanto. En 1947 li trovis la adreson de la subskribinto kaj tiel rekontaktiĝis kun la Esperanto-movado. Li fariĝis membro de la Esperanto-Asocio de Norda Ameriko, kaj post tempo fariĝis tre aktiva en ĝi, servante kiel ano de la Estraro, kaj subtenante la Asocion per regulaj kontribuoj de mono. Li ellaboris imponan projekton por progresigi Esperanton en Usono, kaj interesis sian ĉefon, la milionulon, pri la plano. Post speciala aervojaĝo al Nov-Jorko por diskutoj kun la Ĝenerala

Sekretario de EANA pri la plano, vere komencis aperi, ke la plano estos efektivigata kaj subtenata per sufiĉe da mono por doni bonegan esperon por sukceso.

Bedaŭrinde la afero venis al frua fino kiam la estro de Gibson decidis ne subteni ĝin. Tio okazis ĉirkaŭ la jaro 1950, kiam ankaŭ Gibson ne plu akordis kun la agadplano de EANA kaj eksciis. Ĉirkaŭ la sama tempo lia dumviva amiko, J. W. Wood, mortis kaj post mallonga tempo ankaŭ Dan Ward Gibson elmondiĝis.

— *Lehman Wendell*

NETAŬGA REKLAMO

De Roco

ĈE LA BRUA sonado de la pordsonorilo S-ro Simplulo malgaje forlasis sian brakseĝon, troitis ĝis la pordo, kaj malfermis ĝin. Tuj li estis engolfigata per ondoj da rapide krakantaj vortoj, kiuj eĉ ne momenton paŭzis por respondo.

“Bonan tagon, Sinjoro Simplulo. Mi esperas, ke vi bone sanas ĉi tiun belegan sunbrilan matenon. Via digesto, ĉu ĝi funkcias sengene? Bone! Bone! Bone! Nu, do, Sinjoro Simplulo—” preskaŭ kriegis alta, maldika viro vestita per okulvundantaj koloroj tiel laŭtaj, kiel lia voĉo, viro kun longa, ĉevalsimila vizaĝo nun fendata per grandega ridetaĉo, “—ekprenu viajn ĉapelon kaj palton por havigi al vi la plej ĝojigan

(*Daŭrigata sur paĝo 15*)

TAGMEZA FANTOMO

De R. J. French

LA RUINOJ de malnova abatejo staris, parte kuŝis, en matena sunlumo. Bela grupo da sikamoroj kuŝis angulon de la ĉefa restaĵo. Fringoj ripetis sian akutan frazon kaj el proksima arbaro venis trankviliga rukulado de palumboj. Ĉio ĉi tio, krom la birdkantoj, aperis ankaŭ sur paperfolio, kiun Vincent Marbon jam diligente prilaboris du horojn. Tra granda pinta arkaĵo vidiĝis mistera malluma interno. Do, sur la bildo, tiu aperturo estu tre malhela tamen atmosfera. Vincent volis prezenti tiun efekton per unu tavolo da kolorilo. Li preparis ĝin per ĝusta kvanto da akvo kaj lerte kovris la spacon. Aperis makuletoj kie la papero rifuzis akcepti la kolorilon. Li tuŝis ilin delikate per peniko tamen ili restis.

“Difekto en la papero, aŭ eble iom da graso sur la surfaco”, li pensis. “Kion fari?” La kolorilo eksekiĝis. Levigante por faciligi la streĉon de longa sidado, li kuŝigis la bildon sur sian faldskabelon, bruligis cigaredon, kaj rigardis la belan ĉirkaŭaĵon. Post kelkaj momentoj, turnante la okulojn malsupren al sia bildo, li miris. La makuletoj jam prenis la formon de monaĥo, kiu staris en la arkaĵo kun malĝoje klinita kapo, tiel ke la kapuĉo tute kaŝis la vizaĝon. Per etendita brako la figuro fingromontris en la abatejan internon.

Nun venis la sola homo vidata de la artisto tiun matenon de kiam li komen- cis pentri.

“Bonan matenon. Ĉu vi permesos al mi rigardi vian akvarelon? Ĉio, kio rilatas al la distrikto interesas min; mi estas la loka paroĥestro.”

“Tre plaĉos al mi,” konsentis Vincent, iom malvere, pensante, “kiel mi klarigos pri tiu monaĥaĉo?”

La pastro admiris la ĝeneralan aspekton de la bildo dum li surmetis siajn okulvitrojn, kaj poste kritikis detalojn.

“Vi traktis la foliaron tre lerte, ankaŭ la antikvajn ŝtonojn. Ĝuste tiel la fendo zigzagas supren el la arkaĵo. Kaj mi vidas— mi vidas—”

“Nun li rimarkas la monaĥon,” pensis Vincento. La pastro rigardis la artiston super siaj okulvitraj randoj, malsupren tra la vitroj al la bildo, denove super la randoj al Vincento.

“La figuro estas tre kurioza.”

“Mi ne faris tion. Ĝi aperis propra- vole.”

La mieno de la pastro fariĝis eĉ pli dubema. “Nun li opinias min mensogulo aŭ frenezulo”, pensis Vincento.

“Eble interesas vin fantomoj, kaj tiel plu?”

“Mi tute ne kredas al tiaj aferoj. Efektive mi apartenas al racionalista asocio.”

“Ha!” La paroĥestroj brovoj levigis malaprobe, sed nur momente. Ju pli skeptika la artisto, des pli malfalsa la monaĥa fenomeno. “Ĉu vi ne havas teorion pri tiu eksterordinara aperaĵo sur

via bildo?"

"Mi povas nur supozi. Eble mi sentate difektis la paperon, kaj poste la kolorilo fluis malegale."

"Mi komprenas. Nu la afero estas grava, tre grava." Li paŭzis. "Faru al mi favoron. Vizitu min morgaŭ vespere. Vi renkontos mian amikon, Profesoro Banton, tre saĝa viro. Ni povos kune diskuti la aferon."

La artisto hezitis. "Ni ferias en la proksima marborda urbeto, mi ne povas lasi la edzinon sola tro ofte."

"Kunkonduku ŝin. Tre plaĉos al mia edzino akcepti ŝin. Ni diru la sepan, ĉu?" Vincento konsentis.

"Bone. Ne forgesu alporti la bildon. Jen mia adreso. Ĝis revido."

Konstatinte ke li disponas kelkajn minutojn antaŭ ol marŝi al la marbordo por renkonti sian edzinon, la artisto iris antaŭen por esplori la internon de la abatejo. Ĉe la muroj li seniluziiĝis. Pro pikdrata barilo iom interne, li povis eniri nur dutri paŝojn. Trans la barilo vidiĝis plugilo, erpmaŝino, kestoj, korboj, sakoj, ĉifonoj, rustaj ladskatoloj. Sur amaso da rubo oblikve kuŝis malpura kesto kun majuskloj: "TRINKU LA KAKAON DE SKROPS."

★ ★ ★

"Ha! La bildo!" diris Profesoro Banton, tuj esplorante per dika lenso la monahan figuron. Li rigardis Vincenton suspekteme sed aldonis nur "tre mistera," kaj silente fumis dum la pastro konturis historieton de la abatejo.

"Inter diversaj nefidindaj legendoj troviĝas ateston ke la konstruaĵo ekzistis en la sepa jarcento. Tre mik-sita arkitektura stilo montras, ke la sanktaj fratoj mem rekonstruis partojn de tempo al tempo. Ili tre fieris

pri siaj oraj kaj arĝentaj objektoj, aparte pri granda ora kandelabro, kiun ili konservis ĝis la dek-sesa jarcento; tiam ĝi malaperis kune kun Frato Francisko. Ŝajne tiu hontinda afero tiel ŝokis la malmultajn restantajn fratojn, ke ili neniam restatiĝis. La ruinoj, kiel vi vidis, troviĝas en angulo de farmbieno. La posedanto vojaĝas alilande; do, por permeso esplori ni devos peti al farmisto. Ni faru nian provon antaŭ ol vi foriros. La fantoma monaĥo ne venis sen grava motivo, kaj ĉar li aperis sur via pentraĵo, mi tre deziras ke vi akompanu nin. Mi vizitos Gesinjorojn Grabit morgaŭ au postmorgaŭ, kaj provos fari amikan interkonsenton."

Du tagojn poste, la pastro malĝoje raportis al siaj amikoj. Unue li maltrafis Sinjoron Grabit. Je dua vizito li parolis longatempe kaj senrezulte. La farmisto respondis, ke liaj laboristoj estas tro multe okupitaj; ili ne forigos la objektojn el la abatejo. Plue, la ruinoj troviĝas sur la listo de antikvaj monumentoj; do, la aŭtoritatoj devigas lin, S-ro Grabit, prizorgi la abatejon kaj eksterbari vizitantojn.

"Ion tian mi atendis," grumblis la profesoro, "vi estas tro ĝentila Benĉjo; traktante kun obstina viro, kia Grabit, oni bezonas apiliki iom da premo."

"Mi vere sentas ke tia procedo estas fremda al mia temperamento; mi ne tute komprenas kion vi volas diri per 'iom da premo.'"

"Grabit komprenos morgaŭ, mi mem ĝin aplikos."

Li trovis Sinjoron Grabit riproĉantan siajn laboristojn, kiuj konstruas fojnstakon. Li estis tre malbonhumora, apenaŭ respondante al la saluto de sia vizitanto, kiu tamen, trankvile paroladis pri la vetero, la terkulturo, la silikaj kaj feraj antikvaĵoj, kiujn Grabit iufoje elplugis el siaj kampoj, kaj fine pri la abatejo

(Daŭrigata sur paĝo 13)



ESPERANTO AND STAMPS

by Conrad Fisher

RFD 1, Meadville, Pa.

Until now, this column has been intended primarily for stamp collectors who may or may not be Esperantists. Now, let's say you are an Esperantist but have never taken up stamp collecting; perhaps you don't intend to take up that particular hobby even now, but you would like to make a collection of Esperanto on Stamps, either because you think such a collection will some day be valuable, or merely because you would like to add stamps to your collections of Esperanto books, keys, post cards, and other Esperantiana. You want to know how to get the stamps, how to handle and care for them, and how to display them. All right, here is the information you need.

First, to get the stamps, you must go to a stamp dealer. Of course you might get them without going to a dealer, for example by advertising in Esperanto and other publications, or by "trading" with individual collectors of your acquaintance, but this is the hard way. Use the check-list of Esperanto stamps, identifying them by the numbers assigned them in Scott's catalog, which is the standard reference book of stamps of all countries. If you can't locate a stamp dealer in your locality, write me, and I will put you in touch with one.

Second, the album. The simplest type would be ordinary loose-leaf

binder sheets such as you can get at the 5 and 10. (I hope someday to see special album pages issued just for these issues. I'm working on such an idea now.)

Now, to mount the stamps. *Don't use adhesive tape or "stickum paper"!* Buy special hinges, as we philatelists call them. You can get Dennison's stamp hinges (20c) or Harris' hinges. The requirement of a stamp hinge is that it must be readily removable, or "peelable," from the stamp itself and must stick enough to hold it in the album; otherwise, when you open it your stamps will take off into the air like a flock of homing pigeons. And nothing disgusts a collector more than unpeelable hinges. Many, if not all early collectors had no such means of mounting, and what a job removing stamps from those albums!

Take your loose-leaf pages, and at the top of each sheet type or print in ink the name of one of the issuing countries; then lay the loose stamps on it until you find a layout that pleases you. Then use your hinges to mount them. Of course the sheets must be put into a ring binder, so they can be readily removed for future display purposes. If you don't think you'll ever want to show them, you can use a notebook or composition book.

Esperanto on Stamps is a very good way to approach collectors to tell them about our international language. I've found them very friendly toward the idea and many are quite willing to distribute leaflets among their friends and colleagues. Besides a well laid-out collection of stamps with Esperanto texts is an excellent addition to any display of Esperanto materials at a public library, school, Y.M.C.A., etc.

Here, once again, is the check-list of Esperanto stamps:

Russia

1925: 328, 329.
1926: 347, 348.
1927: 353, 356, 373, 374.
1930: 436, 437.

Brazil

1935: 411.
1936: 427, 442.
1937: 445.
1945: 626, C61.

Bulgaria

1945: B17.

Austria

1949: 539.

Also the new Austrian stamp, which just appeared this year. It is olive brown, with an emerald green star in the center and the words: "50 JAROJ ESPERANTO-MOVADO EN AUSTRIO." The value is one shilling.

REVIEWING THE "REVIEW"

With this issue of the *North American Esperanto Review* we begin our third year of publication. This is something of a milestone; for the history of Esperanto in North America shows that of the many publications which have been undertaken, few have lived longer than a brief year or two. Those which continued on past the two year mark have gone on for many years to play an important part in the total picture of the North American Esperanto movement. We look forward to 1955 with a great deal of anticipation, because we feel that the experiences gained in publishing the *Review* thus far have enabled us to step forward courageously with a bigger, better magazine for you.

This year, as you can see, we have changed our format quite extensively. There are more pages, the type is larger and clearer, and the typography is generally superior to that of the old *Review*. There are 20 pages in this January-February issue; the

issues following will each have 24 or more pages.


The editorial policies under which the *Review* will be operated continue unchanged. These policies are: first, to inform Esperanto League members of the activities of the League; to report news events on the local, national, and international levels of interest to Esperantists; to assist the Esperantist population of North America to further the movement here; and in general to entertain and enlighten North American Esperantists.

The *Review* will gladly cooperate with any organization dedicated to furthering Esperanto. While the magazine is the official organ of the Esperanto League, its reporting of news and its assistance to the general movement will not be limited to the activities of the League and its members.

In 1955 we particularly hope to increase our coverage of the activities of local groups and individuals. To do this, however, we must depend on the cooperation of individual Esperantists who will serve as "correspondents" for each area where there are active Esperantists. Experience has shown that the practical way to insure complete coverage of local news is by the correspondent system. We hope to organize a network of such correspondents during the first months of this year. The duties are simple—merely prepare a brief report of local activities and send it to the *Review* at the beginning of each month. Local groups whose activities are not now being reported in the *Review* are urged to elect a responsible member who will act in this capacity.

It seems appropriate at this time to mention some of the people who have helped in the preparation of past

(Continued on page 15)



Novaj Libroj

La Internacia Lingvo, Faktoj pri Esperanto, de Prof. I. Lapenna. Eldonis Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA. 192 paĝoj kun indekso. Bonaj papero, bindo.

La apero de tiu ĉi informriĉa libro estas grava okazaĵo por nia movado. La libro devus esti normala konsulta verko en la libraro de ĉiu serioza Esperantisto. (Vidu ankaŭ la artikolon "A New Era for Esperanto" sur paĝo 2.)

Rozoj kaj urtikoj de Poul Thorsen. Kun antaŭparolo de William Auld. Eldono de la Komuna Konversacia Klubo, Kopenhago. 117 paĝoj, klara preso, bindita.

La verko enhavas kaj tradukaĵojn kaj originalajn poemojn. Al mi pli plaĉis la originalaĵoj, en kiuj la stilo estas pli facila, pli flua. En la tradukitaj poemoj S-ano Thorsen emas iom al komplikaj, negraciaj konstruoj, ofte uzante "poetikajn" vortojn (*frida*—malvarma, *hasti*—rapidi, *povra*—kompatinda, k. t. p.) tiel ke oni devas relegi du-tri fojojn por ricevi klaran bildon.

Eble la plej bonaj tradukoj estas la lirikaj poemoj (vidu paĝon 3 en ĉi tiu gazeto). Inter la originalaĵoj pluraj memorigas pri la bonhumora stilo de Raymond Schwartz.

Sen dubo ĉi-tiu libro estas meritplena aldono al nia literaturo kaj multaj poeziamantoj aĉetos kaj ŝatos ĝin.

Seven-Day Esperanto Course for International Correspondence, by Leo Tanaka. I have seen, so far, only the "experimental production" of this course, with a statement that it "is part of the author's forthcoming book with the same title." It is to be expected that the completed edition will overcome objections of over-condensation, too hasty compilation, and lack of practice material.

This lesson system is peculiarly suited to the student who wants to learn the rules, then learn use of the language on his own initiative. (This is the most interesting way to learn Esperanto, but probably not effective for the average student.)

Objection must be registered to the author's statement: "This sound (h) is being replaced by K." Such a change may or may not occur. The individual instructor may express his personal opinion to his students, but a textbook, as a quasi-official presentation of the language, should present the rules of the language as officially approved.

f.r.c.



Vokas Bolonjo

(Daŭrigata de paĝo 9)

Adreso: 40-a Universala Kongreso de Esperanto, ĉe CIT, Piazza Nettuno 2, Bologna, Italujo.

Honora Protektanto: La LKK havas la honoron anonci, ke akceptis esti Honora Protektanto de la Jubilea Kongreso S-ro D-ro Luigi Einaudi, Prezidanto de Italujo.

Peto al pioniroj: La LKK deziras havi la nomojn kaj koncernajn detalojn de kongresanoj de la Jubilea Kongreso, kiuj ĉeestis ankaŭ la Unuan Kongreson en Boulogne-sur-Mer, Francujo.

Adreso de la Kongreso: Poŝtaĵoj por la kongreso nepre portu la nomon de la kongreso. Alvenas leteroj adresitaj nur al "CIT", kaj tiu instanco malfermas ilin. La kongresa oficejo estas en la sidejo de CIT (Compagnia Italiana Turismo).

Kongresejo: La ĉefa kongresa ejo de la Jubilea Kongreso estos la Universitato de Bolonjo.

Statistiko (ĝis 31 januaro): Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrio 16, Belgujo 15, Brazilo 3, Britujo 69, Danujo 20, Finnŭjo 57, Francujo 170, Germanujo 79, Hispanujo 4, Italujo 201, Izraelo 1, Japanujo 1, Jugoslavio 37, Kanado 1, Maroko 18, Nederlando 108, Norvegujo 17, Novzelando 1, Portugalujo 6, Sarlando 1, Svedujo 72, Svislando 22, Urugvajo 2, Usono 10; sume 900 el 26 landoj. (22% estas nemembroj de UEA; la plej granda grupo de profesioj estas instruistoj k.s. 18%; personoj sub 20 jaroj 7%.)

Mason Stuttard, KKS.

vidata dekstre en la fono.

La farmisto koleris. "Kio? Vi ankaŭ? Estu malbenata la abatejo. Ĉu vi scias, ke malgraŭ mia granda lupago por ĉi tiu farmo, mi ne povas agi laŭplaĉe pri tiuj ruinoj, kiuj staras sur mia grundo? Lia pastra moŝto provis persvadi min konsenti, ke li esploru la internon de la plej sendifekta parto, kie ankoraŭ ekzistas tegmento. Ne diru ke vi komplotas kun li!"

"Ne temas pri komploto. Ni kredas, ke helpate de vi, ni faros interesajn eltrovojn."

"Mi ne toleros, ke iu ajn spionu sur mia farmo. Mi rifuzas, almenaŭ tion mi rajtas."

"Nu, eble la posedanto permesos, li estas amiko mia."

"Dum mi lupagas, S-ro Trovers ne povas ordoni ion ajn; ankaŭ, klaŭzo en mia lunkontrakto devigas min protekti la ruinojn kontraŭ difekto."

La profesoro decidis ludi sian atutan karton.

"Ŝajnas al mi, vi havas malĝustan ideon pri la termino 'difekto'. La abatejo certe troviĝas sur la oficiala listo de antikvaj monumentoj. Tamen la aŭtoritatuloj ne malpermesus sciencan esploron, kiam mi projektas. Ili certe nomus difektado, ekzemple, la detruon de malgranda peco de la abatejo, kvankam tiu peco starus malproksime de la ĉefa konstruaĵo. Se mi memoras ĝuste, tia aparta peco staris tie, apud via tenejo."

"Tiu ŝtonamaso kadukiĝis kaj mem falis."

"Kaj iu forigis la ŝtonojn."

"Kompreneble, ili obstrukcis la iradon de miaj ĉaroj."

"Kaj el tiuj ŝtonoj oni konstruis la murojn de via porkejo." Grabit konsterniĝis. Ĉi tiu danĝera profesoro scias tromulte. Tre humile li proponis "Eble ni diskutus pli bone super trinkaĵo en la domo."

Profesoro Banton diktis; la rubo estu forigata tuj; lundon vespere la

abatejo estu pura kaj preta. Neniu malhelpu la esplorantojn. "Ne malkaŝu, al viaj laboristoj, la celon. Ili supozu, ke ili laboras nur ĉar la loko bezonas purigon." Li aldonis signife "Ili tre facile povos kredi tion."

La pastro gratulis sian amikon, "Vi estas mirinda Tomĉjo, kvankam viaj metodoj ne tute plaĉas al mi. Do, S-ro Grabit kompleze konsentis?"

"Li lekis al mi la botojn. Por duoble certigi mi subaĉetis lin."

"Subaĉetis!" ripetis la pastro serioze.

"Nu, jes; mi donis al li abundan trinkmonon por liaj laboristoj, bone sciante ke ili neniam vidos ĝin."

Lundon, je la naŭa vespere, la tri konspirantoj eniris la abatejon, kies antikva mistera etoso jam revenis. Iliaj voĉoj kaj piedpaŝoj ehe resonis. Du oleo-lampoj pruntitaj de la farmisto donis malfortan lumon, kiu ne atingis la volbon. Vincento direktis la radiojn de sia elektra torĉo supren kaj vidis nenion krom nigro. Elflugis du vespertoj.

Laŭ la instrukcio de Profesoro Banton ili mezuris, skrapis kaj martelis, ĉiam farante nur obtuzajn sonojn, kiuj indikis ke ne ekzistas kavaĵoj. Tiel forpasis du horoj. Ili laciĝis. Krom la granda arkaĵo kaj du elirejoj ĉe la kontraŭa ekstremo, la sola aperturo en la dikegaj muroj estis granda niĉo, kiu etendiĝis alte supren, sed finiĝis malsupre preskaŭ unu metron super la planko, havante kvazaŭ propran duonrondan plankon en la muro. Sur tiu alta seĝo la profesoro sidigis sin por ripozi, faligante sian martelon apud si. Ĝi sonoris. "Jen kion mi volas aŭdi," li kriis, "alportu la lampojn." Ili konstatis, ke la granda ŝtona plato, sur kiu sidas la profesoro, estas nemovebla. Ili devos atingi la kavon sub ĝi, eltirante ŝtonojn el la muro. Ili forskrapis morteron kaj per fera stango elpremis ŝtonon. La profesoro surgenuiĝis kaj enŝovis la kapon. Ĉar la truo ne estis sufiĉe granda por enlasi samtempe lian brakon, la pastro tenis elektran

torĉon super la profesora orelo. Pro ekscito, pro sia artista temperamento, kaj pleje pro la absurda, ŝajne senkapa, aspekto de la profesoro, Vincento laŭtridis. Tuj Banton eltiris la kapon kaj demandis kolere "Ĉu vi diris ion?" Vincento ne riskis malfermi la buŝon, timante ke li denove ridegos. Li kapneis, dolore kaj malfacile regante sin. "Ho," diris la profesoro atakeme, sed ne povis elpensi ion por pludiri; do, li reenŝovis la kapon. Poste, li anoncis, ke li vidas objekton volvitane en bruna materialo. Ili pli grandigis la truon ĝis la planko, vidis kaj palpis la kovritan objekton. Dum ili ankoraŭ forigis ŝtonojn venis la voĉo de Grabit, kiu postenis ekster la pikdratoj por averti la serĉantojn pri eventualaj preterpasantoj. "Sinjoroj, ne forgesu la klaŭzon en mia lukontraktado pri difekto al la abatejo." La profesoro respondis tiel forte kaj maldelikate, ke lia pastra moŝto ŝajnis, ne tre sukcese, ke li ne aŭdas.

Fine ili eltrenis la objekton kaj rapide malvolvis la brunan ŝtofon. Grandioza ora kandelabro aperis. Malfacile, pro ĝia pezo, ili starigis ĝin sur la ŝtonan tablon en la niĉo, kie ĝi brilegis kontraste kun la malhela griza muro. El la centra kandelango disbranĉiĝis ses aliaj.

Ĉiuj rigardis silente. Vincento vidis ĝin kiel rave simplan bildon. La praktika profesoro pensis "kion fari nun?" Sinjoro Grabit, rigardante de trans la barilo, penis kalkuli la valoron kaj bedaŭris ke li ne estas la sola trovinto. La paroĥestro imagis, ke la kandelabro staras sur la altaro en lia propra preĝejo. Eble li troigis asertante "Tuj kiam mi vidis la monaĥon sur la bildo mi sciis, ke tiu estas Frato Francisko reveninte por riveli la kaŝejon de la kandelabro, pruvante ke li ne ŝtelis ĝin. Timante ke ĝi estas konfiskota, la fratoj kaŝis ĝin, kaj Francisko oferis sin, vagante sola en la mondo dum la kalumnio disvastiĝis, por trompi la konfiskantojn."

(Continued from page 11)

issues of the *Review*: Conrad Fisher, Ferd Carlson, Elwyn Pollock, Donald Parrish, Helene Wolff, Dirk Brink, James D. Sayers, and Lehman Wendell. There are many others, too many to list here. To all who have helped in any way, our heartfelt thanks.

We note with regret that a chief contributor, W. G. Adams, has passed away. We will miss his down-to-earth articles, which always reflected the wisdom of his long experience. One of Mr. Adams' last activities was a plan to perpetuate a record of the early history of the North American Esperanto movement. It was his belief, and we certainly agree, that some competent Esperantist should tackle the job of collecting and preserving early books and papers, as well as names and dates pertinent to our early history. Not as a substitute for such a project, but in line with it, the *Review* plans to publish a number of articles about the early days of the movement. In fact, the first such article, written by Lehman Wendell, appeared in our last issue and the second article in the series, also written by Dr. Wendell, appears in this issue. We would like to take this opportunity to invite any reader who has knowledge of some event or personality prominent in the early North American Esperanto movement to contact us so that we can use that material for an article in the series.

We would like to see more activity on the part of North American Esperantists in literature. We note with dismay that few of us are interested in this important field. Poems and short stories of length suitable for the limited amount of space at our disposal are always welcome. When such material, produced by North Americans, is not available to us, we will continue to import suitable material from other countries.

We are glad to see that most of our old friends have already renewed their memberships or subscriptions and that they will be with us in 1955. We hope that many others will join them, and us, by joining the League or, at least, by entering their subscriptions to the *Review*.

To all our readers, our heartiest wish for a successful 1955!

(*Daŭrigata de paĝo 7*)

surprizon de via vivo. Rapidu, mia bona amiko, vi tute ne volas maltrafi ĉi tiun miregigan oportunaĵon."

La viro ne permesis ian pripensadon pri la florado de neatenditaj amikecoj, sed kriis, "Vidu," flankenpaŝis, kaj fingromontris al li brilan novan aŭtomobilon starantan ĉe la rando de la arbobordita strato. "Jen la miraklo", li ĉevalblekis, "de nia mirakla epoko. Venu, Sinjoro Simplulo. Mi elmontros al vi per mallonga veturo, ke ĉi tiu aŭtomobilo estas la respondo al ĉiuj viaj revoj."

Kvankam vintre, estas bela tago, S-ro Simplulo senvorte konfesis al si, kaj li ĝuus veturadon, se li povus fermi la orelojn kontraŭ la babilaĉo de ĉi tiu vendisto. Nu, li riskos tion. Li prenis ĉapelon kaj palton, kaj ili baldaŭ estis pretaj foriri.

Tamen, post ili eksidis, la vendisto faris paroladon pri la mirinda simpleco de la maŝino: "oni povas gvidi ĝin per unu eta fingro; la rapido estas ĉiam sub via rego; ĝi estas entute kvazaŭ parto de via propra korpo; eĉ kvarjarulo povus veturigi ĝin sendanĝere..." k. t. p. kredeble senfine.

Sinjoro Simplulo krude interrompis. "Nu, do, igu ĝin kuri. La tago malpli-

iĝadas. Ekfunkciigu ĝin. Ni iru.”

La vendisto ekmoviĝis. “Ho, jes, jes! Ni iru. Ha, ha! Rigardu kiel facile—”

Estis subita muĝo. La bela aŭto saltegis trans la stratrandaĵon, ĉifis la dekstran antaŭan kotŝirmilon kontraŭ arbtrunko, tremetis, ĝemetis, kaj iĝis silenta.

La konsternita vendisto stulte ekrigardis la kolektiĝantan homamason, kaj murmuris, “Mi veturigis ĝin de la vendejo ĝis ĉi tie. Mi veturigis ĝin de la vendejo ĝis—”

“Ĉu vi neniam antaŭ ol tiam veturigis ĉi tiun aŭton?” demandis S-ro Simplulo.

“Ne, mi ĵus dungigis hodiaŭ matene,” konfesis la nefeliĉa vendisto. Tamen mi opiniis—”

“Nura opinio ne sufiĉas,” milde diris S-ro Simplulo. “Estas malprofita reklamo fanfaroni pri la utileco de io ajn, se oni mem ne povas regi ĝin.” Li malfermis la aŭtopordon por eliĝi. “Vi memorigas min pri amiko. Kiel vi, li havis ion tre bonan, tute necesan kaj facile utiligeblan, kio indas la tujan atenton kaj uzigaĵon de ĉiu persono surtere. Sed kiel ĉe vi, lia vendparolo estis nuligata pro lia nekapableco manipuli la aferon.”

“Kia estis la afero?”

“Esperanto.”

KONSTANTE PORTU
LA VERDAN STELON

DEATHS

We note with regret the passing of Andrew S. Vinzent of Oakland, Calif. In earlier days S-ano Vinzent was an active participant in Bay Area Esperanto activities. In later years he continued to serve the movement as UEA delegate for Oakland. He was a life member of the UEA.

Pri la malfruigo

La redakcio ĉiel klopodas eviti malfruigojn en la eldono de nia gazeto. Situacioj tamen okazas, kiuj estas ekster nia povo. Sendube niaj legantoj sentos bedaŭron pro la akcidento, kiu trafis nian helpredaktoron kaj presiston, Ferd Carlson, lasante unu manon malutila dum pluraj semajnoj. Feliĉe la reboniĝo okazas kontentige kaj la mano estos baldaŭ denove uzebla. Intertempe la presado de la gazeto malfruis. Nian specialan dankon al S-ano B. Lerman kiu kune kun la redaktoro disponigis multajn ekstrajn horojn da laboro por finfine eldoni ĉi tiun numeron.

ĈINA KOMERCA AGENTO

Ĉina komerca agento en Hong Kong vendas ĉinajn ludkartojn, ĉinajn kaj aziajn poŝtmarkojn kaj ĉiun alian materialon el Hong Kong je tre moderaj prezoj. Deziras korespondi kun usonaj gesamideanoj aerpoŝte.

Disvastiga prezento petata! Nepre respondos.

S-ro Wong Ling Kai, 72, Lockhart Road, 1st Floor, HONG KONG, Azio

SIMPLE BOOKS IN ESPERANTO

Tejo kaj Ĉerik35
Johano kaj Silvio	30
Junaj Detektivoj35
Gaja Leganto per Esperanto30
La Hundo Kruso60

Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.

APPLICATION BLANK

I enclose \$_____ for: (check)

Regular member	\$ 3 00
Supporting member	5.00
Patron	10.00
Life member	50.00
Man and wife	4.00
Subscription only	1.75
Name	
Address	
City	

Print your name and address clearly. Send to: Esperanto League for North America, Meadville, Pa. Advise the League promptly if you change your address.